

V - 19479/35

Bulgara

ESPERANTISTO

ENJO DASKALOV

TEKSTILA TEĤNIKUMO

VRACA — BULGARIO



1966

12

ENHAVO

	Paĝo
Ĉefartikolo. Denove pri Esperanto en la fakoj (Simeon D. Simeonov)	1
Kamjén Istvan. Dum unu minuto	2
Ida Lisičnik. Venos la horo	3
Nikolaj Uzunov. Al Zamenhof	3

ORGANIZA VIVO

B. Kavalĝiev, C. Kolarov, Cv. Todorov, Iv. Šivarov, J. Zap- rjanov, J. Atanasov, Nikola Tarakĉiev, Kr. Todorov, Iv. Stoimenov	6
---	---

Kovrilpaĝo: Ripozdomo en restadejo Borovec en Rila-montaro.

*Abonkalkulo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv.
2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio
Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv.
Reklamtarifo: 0,15 levoj por m²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv; korespond-
anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.*

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, R. Kongresi Per-
metit 7—II/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco
Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang
P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 2
Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Sep-
tembrie 65, București 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul. 52/54
kv. 19, Moskva, B—162.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 10—a.



DENOVE PRI ESPERANTO EN LA FAKOJ

Kiam temas pri enkonduko de Esperanto en la fakojn, kelkiam oni pensas pri iu specifa aŭ limigita, se ne flanka agado de la esperantistoj. Ofte tio rezultas pro la divido de la agado de la esperantistoj en du apartaj sferoj — unuflanke en la E-movado, aliflanke sur la faka tereno kiel fakuloj. Sed kion signifas enkonduko de Esperanto en la fakojn, se ne la aplikadon de la Internacia Lingvo en la praktika vivo kaj ĉu ne al tiu sama celo estas dediĉita la tuta esperantista movado, nia informado, organiza laboro kaj la granda plimulto de la E-organizaĵoj, unuavice de UEA kaj ties landaj sekcioj. Kaj la Universalaĵ Kongresoj kaj la Artaj Festivaloj kaj ISU kaj la grandega kampanjo kun peticio al UN prezentas esence klopodojn pri enkonduko de Esperanto en la internaciajn rilatojn, do ankaŭ en la internaciajn kontaktojn de la homoj kiel fakuloj.

Se la rezultoj atingitaj ĝis nun estas relative modestaj, tio tutsimple montras, ke la efektiva enkonduko de Esperanto en konkretajn mediojn aŭ okazojn renkontas plurfoje objektivajn malfacilaĵojn el politika, psikologia, teknika kaj tiamanca karaktero. Tio signifas same ke niaj propraj fortoj estas ankoraŭ limigitaj, ke nia delegita reto bezonas perfektigon, ke niaj fakaj E-organizaĵoj bezonas organizan stabiliĝon, ke la esperantistoj-fakuloj malmultas pli kaj pli ofte doni ekzemplojn de konkreta aplikado en kiu ankaŭ la fakaj terminoj trovas iom post iom siajn pli ĝustan kaj racian formon.

Tamen certe ne per brue proklamitaj kampanjoj, per malgranda parto de niaj fortoj kaj en dek jaroj (!?) la problemoj de la aplikado de Esperanto en la fakoj estos solvitaj. Similaj utopiaj proponoj trans la kapoj de la ekzistantaj naciaj kaj internaciaj Esperanto-organizaĵoj povas konduki al seniluziigo, ĉar ili estas deŝiritaj de la konkreta socipolitika situacio en la mondo.

Universala Esperanto-Asocio, ĝia Komitato, landaj sekcioj, aliĝintaj kaj kunlaborantaj fakaj asocioj daŭre donas atenton al tiu problemo. La nuna Generala Kunsido en Budapeŝto, dediĉita al la fakoj kaj ankaŭ speciala komisiono pristudis la nunan staton kaj formulis konkretajn taskojn. Oni decidis dediĉi tute specialan zorgon al la kunmeto de pli racia delegita reto. La proksima kongreso en Tel-Aviv estos interalie dediĉita al la turismo kaj lige kun tio speciala revueto Esperanto-Turismo komencos apari.

Bulgara Esperantista Asocio, kiu subtenas ĉiun seriozan klopodon akcelantan al pli vasta aplikado de Esperanto en la internacia vivo kaj tiunmaniere la interpopolan interkompreniĝon, ankaŭ nun per la eldonado de la luksa turisma revuo „Ripozoj“ en Bulgario donas ekzemplon pri realeca al-

paŝo al la problemoj kaj efika agado. Sed tiu unika ekzemplo devas esti praktike subtenata de la bulgara kaj internacia esperantistaro, por ke la koncernaj ŝtataj turistaj organoj daŭrigu ĝian aperigon. Se per la klopodoj de la tutmonda esperantistaro ni sukcesos firmigi la eldonadon de „Ripozoj“ tio povus esti bona ekzemplo ankaŭ por turismaj administracioj en aliaj landoj.

Ankoraŭ granda laboro estas plenumenda por la stabiligo de la jakaj sekcioj de BEA por la variigo kaj konkretigo de ilia agado. La organizota en 1968 en Bulgario kongreso de IFEF estas konvena okazo turni specialan atenton al la varbado inter la fervojistoj.

Resume, la ekzistantaj formoj, ĉe bone pripensita kaj akordigita agado donas plurajn eblecojn pri iom-post-ioma progreso en la praktika enkonduko de Esperanto en diversajn sferojn de la vivo. Necas pri tio pli granda iniciato de la esperantistoj-fakuloj mem kaj daŭra per ekliigo de nia organizita reto. La lanĉado de „rapidaj sistemoj“ nur povas malhelpi per la disdivido de la entute modestaj homaj kaj materialaj rimedoj de la movado kaj krei falsan perspektivon ĉe niaj aktivuloj.

DUM UNU MINUTO

de Kamjén István

De tempo al tempo kaptas min arda deziro forlasi tuj la grandan urbon kun ties terura trafikbruego kaj iri ien, kie regas silento kaj trankvilo.

Mi supreniras la placeton sur la ŝtuparo ĉe la bazo de la Gelért-statuo, por momento mi haltas tie kaj admiras la pitoreskan pejzaĝon, la Dunubon fluantan mal supren, kaj la pontojn, kies arkajoj pendas gracie super la riverego. Poste mi atingas la promenejon ĉe la Citade'lo kaj de tie mi ĝuas la ĉarman pejzaĝon, avide enspirante la puran aeron. Herboj, arbustoj, floroj dissendas ĉiufanken bonodoron, kvazaŭ giganta fabriko, produktanta nur aromojn, por ĝuigi la homojn, por ebriigi ilin dolĉe. . .

Sur multaj lokoj sidas homoj kaj admiras la urbegon, vualitan de fumo, rampanta kiel malhela drako sub la blua firmamento.

Mi direktas min al benko kaj eksidas. Baldaŭ venas nekonata blankharulino kaj okupas lokon apud mi. Nur kelkajn minutojn ŝi rigardas la antikvajn ŝtonmurojn de la Citadelo, poste malrapide malfermas sian plastsaketon,

prenas el ŝi manlaboraĵon kaj komencas kroĉtriki.

Gajaj infanoj pasas antaŭ ni. Ili estas vicigitaj en kolono kaj kantas tiom laŭte, ke la tuta ĉirkaŭaĵo resonas tondre. Gracia virino, vestita en blanka mantelo, de tempo al tempo haltas kaj afable invitas la postrestintajn infanojn plirapidigi siajn paŝojn.

La manoj de la sidanta apud mi blankhara virino ĉesas moviĝi, kaj ŝi rigardas, rigardas longe kun amo la malproksimiĝantajn infanojn. Subite en la ĉielo aperis aeroplano, flugante super ni kun tondra muĝado. La tuta ĉirkaŭaĵo ektremis, la benko sur kiu ni estis tremis, kaj mi eksentis, ke la virino ankaŭ tremis per la tuta korpo. Kiam denove ekregis silento, ŝi profunde ĝemsopiris.

— Verŝajne vi timas? — mi demandas. Ŝi levas al mi siajn grandajn, grizajn okulojn kaj denove profunde ekĝemas:

— Jes, vere. . .

Nur malofte tie ĉi superflugas aviadiloj — mi diras.



— Mi tute ne ŝatas ilin. Tiu terura bruego ĉiam vekas en mi ĉagrenajn rememorojn el la pasinteco.

— El la pasinteco?

— Jes.

Instinkte mi proksimiĝis al la virino, por aŭdi pli bone kion ŝi rakontos. Mi opiniis, ke ŝi farbas blanke sian hararon laŭ la lasta modo. Kaj vere, la blanka hararo bone harmoniis kun ŝia vizaĝo, kvankam ŝi ne ŝajnis al mi tiom maljuna. Mi eĉ ne povis imagi kioman aĝon ŝi havas. Post mallonga hezito, mi provis demandi ŝin kia estas tiu malagrabra rememoro, pri kiu ŝi menciis kun ĝemsopiro.

— Mi tute ne ŝatas pensi pri tio, eĉ mi preferas forgesi ĝin por ĉiam, sed, bedaŭrinde, malgraŭ mia volo, mi ne kapablas forviŝi ĝin el mia memoro — ĉiam reaperas en mi tiu terura tago, kiam ni devis kaŝi nin en la kelo, por ŝirmi nin kontraŭ la bomboj. . . Ĉar supre, en la etaĝoj, estis neelteneble kaj danĝere. Eĉ niaj nervoj preskaŭ ŝiriĝis pro streĉiteco. . . Mia edzo, inĝeniero, persvadis min, ke ni nepre devas resti en la kelo. Mi havis filinon 18-jaran, kun grandaj bluaj okuloj kaj belega krispa hararo. Ŝi jam estis antaŭ sia abiturienta ekzameno. Ni pasigis jam tri semajnojn en la kelo, ĉion ni konsumis, kaj tiam eĉ la fabo havis oran valoron. . . De tempo al tempo ĉesis la bruego de la eksplodoj. Iuj homoj kuragiĝis eliri el la keloj, por detranĉi viandpecon el la ĉevalo, kiu kuŝis morta sur la strato. El ĝi oni faris festotagan tagmanĝaĵon! Mi diras „festotaga“, ĉar tiam ĝi tion signifis. Multaj homoj kolektiĝis en la ŝirmejo. Akvon nur malofte ni havis, por almenaŭ iomete lavi nin. Regis abomeninda fiodoro ĉiuloke. . .

Mia edzo estis silentema homo, neniam li partoprenis en la konversacioj. Vi eble scias, kia estis la situacio tiutempe — opinioj plej diversaj. Tamen estis homoj, kiuj laŭte manifestis siajn pensojn. Aliaj silentis, nur silentis. Sed

inter ni estis ankaŭ senpovaj malsanuloj, kaj tio terure efikis al ni. Mia filino ĉiam tiriĝis al mi, dirante malĝoje: „Kara panjo, nur baldaŭ finiĝu tiuj ĉi teruraĵoj! Neniam poste mi estos malkontenta!“ Ŝi, kiu neniam antaŭe estis malkontenta aŭ kaprica, diris tion. . . Lastatempe oni diras, ke kie estas eĉ nur unu infano en la familio, tie estas malfacilaĵoj kaj malpaco, ĉar la nunaj infanoj estas postulemaj, kapricaj, eĉ iom impertinentaj. Tamen mia kara filino estis nek impertinenta, nek postulema. Ŝi vivis nur por la lernado, tiom sciama ŝi estis. Same tiel ŝi amis nin ambaŭ, egale, preferante nek sian patron, nek min. Ŝi helpis ĉiam al siaj kunlernantoj. Neniam ŝi kaŭzis al ni malagrabraĵojn. Bone ŝi ludis pianon, kaj mi sidis, fiere aŭskultante ŝin. . .

Do mi ne volas rakonti al vi detale pri ŝia tuta infanaĝo aŭ pri la vivo de mia edzo kaj mi. Laŭprofesie mi estas gimnazia instruistino. Ankaŭ miajn lernantojn mi tiel edukas, por ke ili fariĝu modestaj, veraj homoj. Ili ne estu egoistoj, ili vivu kiel homoj unuigintaj en granda kolektivo.

Iun nebulan decembran tagon, kiam ni estis en la ŝirmejo, mi rememoris, ke ie en la manĝajkamero mi estis lasinta iom da fabo. Mi intencis supreniri tien. Regis provizora silento. Mi decidis kuiri el la fabo bongustan manĝaĵon. Mia edzo kaj la filino petis min ne iri tien, ŝed vidinte, ke ili suferas pro malsato, mi ne p'u povis elteni kaj iris supren. Tie mi iom purigis la loĝejon, ĉar ĉio estis kovrita per fulgo, polvo, kaj mi, kiu tre ŝatis la purecon, la ordon, ne povis tion rigardi. Post kelkaj minutoj mia edzo kriis al mi lasi tiun ĉi aĉan fabon. Mi respondis, ke kiam la fabo estos finkuirita mi malsupreniros. Post tio, mi prenis la manĝilaron, pecon da pano kaj komencis malsupreniri la ŝtuparon. Kaj ĝuste kiam mi atingis la teretaĝon kaj estis preskaŭ ĉe la pordo de la kelo, mi aŭdis teruran eksplodon, tondron kaj

kovris min polvo. Tra la ruboj mi alpaŝis al la pordo de la kelo kaj kriis:

— Géza!... Géza!... Mia Eva!... Mia filineto!...

Preskaŭ rampante, mi atingis la kelon, kaj mi vidis, ke malsupre ĉe la ŝtupo kuŝis vizaĝaltere mia filino. Nigra ŝi estis pro fulgo kaj polvo. Nun mi ne scias, kiel mi forĵetis la poton, en kiu estis la manĝaĵo. Mi fine sukcesis eltiri el la ruboj mian malfeliĉan infanon. Poste mi lasis ŝin ĉe la ĉefa ŝtuparejo kaj iris en la straton, kriante. Venis kelkaj homoj, kiuj faris portilon el latoj kaj lignotabuloj. Ni forportis la filinon en la klinikon. Dumvoje ni ofte devis deflankiĝi por kaŝi nin, ĉar aviadiloj ĵetis bombojn ankoraŭ. Fine ni atingis la klinikon. Tie en la kelo estis amasigitaj multaj vunditoj, malsanuloj, sed mi tiel arde petegis la kuracistojn, ke ili konsentis tuj fari la operacion ĉe kandellumo, ĉar elektrolumo ne estis. Sed ili ne povis fini. Apenaŭ ili komencis, jen denove venis aviadiloj. Tie mia filineto mortis. . .

Tiam mi direktis min returne al nia sirmejo. Ĝi estis trafita de bomboj. Ankaŭ mia edzo estis mortigita. Ĉion mi traserĉis. Mi trovis nenion. Sed mi portis kun mi ĉiam mian mansaketon, en kiu estis niaj valoraĵoj. Mi ekkuregis al la Enteriga Entrepreno, por aĉeti ĉerkon. . . Mi erarvagadis tra la urbo. Kiam ekestis silento, mi denove iris por serĉi mian edzon. Tiam mia hararo tute blankiĝis.

Alian tagon, kiam mi reiris al la kliniko, oni sciigis al mi, ke mian karan filineton oni jam enterigis en la Herboĝardeno, en komunan tombon. Pro granda sufero mi eĉ ne povis plu pensi. . .

Kiam finigis la bombadoj, en la ĉirkaŭaĵo oni elfosis tombojn. Ĉie mi ser-

ĉis. Tiun ĉerkon, kiun por mia filineto mi pagis, mi rekonis, sed kiam oni malfermis ĝin, mi mirkonsternite vidis, ke nekonata viro kuŝas en ĝi!

Nur dum unu minuto mi perdis ĉion. . . Mi perdis la homojn, kun kiuj mi estis unu. Ĉu vi jam komprenas, kial mi ektremas pro teruro, kiam aviadilo tondre zumas super mia kapo? Ĝi vekas en mi tian teruron, ke mi preskaŭ perdas la konscion.

Jen pro kio mi abomenas la kruelecon, kiu tatale puŝis min en konstantan solecon. Nun mi sopiras elŝiri el la koro de la homoj ĉion kio estas malbona, kio povas amarigi la animon. Mi volas planti nur amon, interkomprenon, pacon, diligentecon. Ĉar nur la diligentecon kaj la amo povas nobligi la homon. Nur tiel en la animoj naskiĝos la kredo, la espero, por ke regu nur la bono, kaj la malbono malaperos por ĉiam desur la tero.

Nun mi loĝas kune kun mia fratino. Bone ni interkomprenas nin. Sed, ho ve, mi perdis miajn amatajn. . . ili ne plu estas vivaj. . . Mi volas ekstari antaŭ la tuta mondo kaj ekkrii laŭte, por ke ĉiu aŭdu sur la tero: — Homoj! Fratoj miaj! Neniam plu militu! Amu unu la alian!

Pardonu al mi, ke mi tedis al vi, rakontinte tiom multe da teruraĵoj!

La blankhara virino ĉesis paroli, kaj silente daŭrigis la kroĉtrikadon.

Belvestita, alta blondulino pasis preter la benko, tenante libron en la mano kaj laŭte legante tekstopartojn el ĝi. Evidente, ŝi lernis sian lecionon sub la libera ĉielo. La blankhara virino levis al la knabino sian rigardon kaj dum tiu ĉi malproksimiĝis, ŝi prenis sian poŝtukon kaj malrapide viŝis al si la larmoplenajn okulojn.

El la hungara esperantigis: Szalay Sándor



VENOS LA HORO

de Ida Lisicnik

Vekiĝas popoloj — per tio l' espero —
ekregos frateco kaj pac' sur la tero;
kaj venos finfine la homa prudento,
kompreno, ke eblas la viv' en konsento.

Kaj kvankam alarmon alportis l' etero,
kaj kvankam malicas la rondoj konkeraj,
por kiuj militoj fariĝis la fonto
de neelĉerpeblaj profitoj senhontaj.

Sed forta nun estas la vol' de l' homaro
decide fortigi plu la kontraŭstaron;
por ĉiam torigi l' atoman minacon,
atingi per ĉiuj rimedoj la pacon.

Vekiĝas popoloj — per tio l' espero
ke venkos konkordo kaj pac' sur la tero.
Ni ĝoju ke ankoraŭ ja nia fervoro
akcelas alvenon de tiu ĉi horo.

Kutaisi 1966

AL ZAMENHOF

*„... Obstine antaŭen la nepoj vin benos
se vi pacience eltenos!...“*

L. L. Zamenhof

de Nikolaj Uzunov

Jen, baldaŭ ekbrilos la hela aŭroro
per paŝoj rapidaj ĝi venas! ...
Sed ĉiam memoras ni vin en la koro
kaj ni, viaj nepoj, vin benas!

Nun ne plu briletas malforte la stelo
per lumo radia ĝi plenas,
jam fine disiĝas la densa malhelo
kaj danke la nepoj vin benas!

La verdan standardon, de vi flirtigitan,
ni ĉiam tre alte nin tenas!
Obstine irante la vojon celitan
nun ni, la genepoj, vin benas!

Neniam timigas nin ŝtormo kaj vento,
nek moko de l' homoj nin ĝenas!
Ne perdas esperon ni eĉ por momento —
ni, viaj genepoj, vin benas!

Kaj scias ni — estas ankoraŭ laboro,
sed ĉiam ni firme postenas!
Pro via komenco, pro via fervoro,
ni dankas vin, laŭdas kaj benas!

ORGANIZA VIVO

RUSE. Dum la kuranta jaro ni planis malfermi kurson por geinstruistoj el ĉiuj loĝlokoj de nia distrikto. Tiucele kelkfoje la prezidantoj de distrikta komitato k-do Ĥristo Ĥristov, de urba societo „Libero“ k-do Stojan Cvetkov k. a. aktivuloj kontaktis la ĉefon de la fako por popola klerigo k-do Samanĝiev kaj kune kun la prezidanto de la profesia instruista societo interkonsentis dum tiu ĉi lernjaro malfermi kurson, por ke la profesiaj pedagogoj fariĝu kapablaj estontaj lektoroj en diversaj lokoj kaj lernejoj de la distrikto. En la komenco de oktobro k-do Samanĝiev subskribis cirkuleron, dissenditan al ĉiuj lernejestroj en la distrikto.

Estis difinita la tago de la malfermo 23-an de oktobro, dimanĉe je la 10-a horo antaŭtagmeze en la kultura domo de la instruisto. Vere tiu ĉi tago restos neforgesebla por la esperantistoj en Ruse. 22 personoj okupis la lokojn en la salono, por eniri la vicojn de la E-movado kaj per sia profesia pedagoga majstreco fariĝu estontaj bonaj lektoroj. La prezidanto de la distrikta komitato k-do Ĥristo Ĥristov malfermis la solenaĵon per konciza parolado. Li donis la parolon al Boris Kavalĝiev, kiu emfazis la signifon de la hodiaŭa solenaĵo.

Radio Varsovio en sia regula emisio anoncos al siaj aŭskultantoj informojn kaj pruvos, ke la bulgaraj esperantistoj kaj bulgaraj geinstruistoj troviĝas en la antaŭaj vicoj de la tutmonda E-movado. K-do Kavalĝiev promesis peti, kiel kunlaboranto de Radio Varsovio, ke oni anoncu en la emisio, la dezirantaj aŭskultintoj en la tuta mondo direktu mallongajn gratulojn per PK al la novaj gekursanoj por esprimi sian ĝojon, bondeziron kaj solidarecon pri la sukceso. La adreso estas: Bulgario, Ruse, str. Slavjanska, Dom na učitelja, kursgvidanto k-do Stefan Popov. K-do Kavalĝiev deklamis versaĵon. La sperta longjara kursgvidanto (eksinstruisto) k-do Stefan Popov komencis sian unuan lecionon. Post la fino oni faris komunan foton. La sekvontan dimanĉon oni atendas aliajn kursanojn, kiuj ne sukcesis ĉeesti la malfermon.

✱

Laŭ la plano la 7-an de novembro devis okazi distrikta konferenco en vilaĝo Batiŝnica samtempe kun la loka vilaĝa festo.

El Ruse forveturis la reprezentantoj de ĉiuj 5 societoj, gvidatj de la prezidanto de DEK k-do Ĥristo Ĥristov. En Batiŝnica alvenis la reprezentantoj el Dve Mogili, Borovo, Kacelovo, Bjala. Ne mankis la konata jam plej juna esperantisto el Ruse Enĉo Kirilov.

La partoprenantoj kunvenis en la kultura domo kaj k-do Ĥristo Ĥristov malfermis la kunvenon, kiun unua salutis Enĉo Kirilov, 7-jara knabo. Laŭ la tagordo la veterano D-ro Zahari Boĉev el Dve Mogili rakontis siajn impresojn pri la 51-a UK en Budapeŝto. La interesa temo estis bonega propagandilo pri Esperanto. La konferenco decidis ke tiu ĉi valoro prelego estu ripetata antaŭ publika vilaĝa kunveno kaj tiamaniere ĝia efiko estos plej utila. Poste sekvis la organizaj demandoj kaj la reprezentantoj de ĉiuj societoj parolis pri siaj lokaj aferoj, pri la kursoj, pri la sukcesoj kaj malfacilaĵoj. Estis interŝanĝita la sperto kaj oni faris diversajn proponojn. Oni povas diri, ke la konferenco sukcesis bone. Bonajn proponojn faris k-do Kalinov. En sia salutparolado je nomo de societo „Libero“ — Ruse, k-do Boris Kavalĝiev rekomendis ke la esperantistoj ĉiuloke plialtigu la aktivecon de sia agado.

La konferenco estis salutita de la sekretario de la loka Komsomolo kaj de la prezidanto de la Patrolanda Fronto — mem esperantisto. Tre kontentaj la partoprenintoj planis la sekvontan konferencon en v. Dve Mogili. La gastoj estis akceptitaj en la domoj de la lokaj esperantistoj kaj tagmanĝis kune laŭ la tradicio de la vilaĝa festo. Dankemaj ni forveturis kun espero ke ni utiligos la renkonton por pluaj sukcesoj de nia movado.

B. Kavalĝiev

SVIŜTOV. Studenta E-societo „Alko“ ĉe Supera Financa Instituto organizis ekspozicion. Estis ekspoziciitaj esperantaj revuoj kaj gazetoj, bildoj, fotoj, bele afrankitaj leteroj k. a. La urbanaro observis ĝin kun granda intereso. En la komenco de oktobro ni preparis esperantan tabulon, kiun ni metis en la instituto. Sur la ĉefa strato kun la urba E-societo „Danuba Stelo“ ni havas propran esperantan vitrinon, kiun ni regule aranĝas. La foto prezentas la aranĝon de la vitrino.



Ni kredis, ke nia propagando kontribuos por la plua disvastigo de nia movado.

Coĉo Kolarov



ESPERANTISTA MANIFESTIĜO KONEKSE KUN LA KONGRESO DE BKP

Ni estas dankemaj al la Partio kaj la Popola Registaro pro la granda subteno kiun donas al nia movado. Ni, la esperantistoj el Ŝumen, decidis niaflanke renkonti la IX-an Kongreson de BKP per sia kontribuo.

Dum la ĉiujara tradicia „verda propaganda E-semajno“, kiu ĉi-jare estis organizita de la 3-a ĝis la 10-a de oktobro, helpitaj de la Urba Komitato de Patrolanda Fronto kaj la Regiona Komitato por defendo de la Paco, ni aranĝis E-ekspozicion.

Ĉe la malfermo ĉeestis multaj geurbanoj, membroj de societo „Vekiĝo“. Gastis al la solenaĵo k-doĵ V. Sâbev el la Regiona Komitato de BKP, Lazarov el la Komitato de la Patrolanda Fronto kaj Elenkov—Direktoro de IV Elementa lernejo.

La prezidanto de „Vekiĝo“ k-do Bojaĝiev diris: „Per la aranĝo de tiu ekspozicio, ni volas esprimi nian dankon al la Partio-gvidanto, nian pretecon konigi al la tuta mondo la sukcesojn kaj la belecojn de nia Patrujo, akiri novajn amikojn“.

La ekspozicio vekis grandan intereson: En daŭro de unu semajno pli ol 8,500 geurbanoj kaj gelernantoj rigardis la belegajn bildojn, afiŝojn, fotojn kaj diagramojn.

En la centra loko, sub la portreto de G. Dimitrov, oni legis lian eldiron: „Via agado per Esperanto estas valora kaj vi devas daŭrigi ĝin“. Tie ĉi estis la letero kaj ordeno „Kiril kaj Metodij“, I grado, per kiuj oni distingis la societon. Apud la portreto de D-ro Zamenhof oni vidis la verdan silkan standardon de la societo, kudrita en la jaro de la fondiĝo de l' societo — 1905.

Bonege estis aranĝita la angulo dediĉita al la 60-jara agado de la esperantistoj el Ŝumen. Tie ĉi estis la fo-

toj de la fondiĝo de la societo Ilija Silvestriev, de geesperantistoj-antifaŝistoj Vela Piskova kaj Avgust Popov, letero-peto de 1935 j. al la polico pri permeso de organizado de kunvenoj, parto de la societaj korespondaĵoj, parto de la korespondaĵoj de Ilija Todorov kaj Ivan Jankov, At. Bojaĝiev, kiu korespondis en 1923—33 j. kun esperantistoj el USSR, la revuoj „Antireligiulo“, „Internaciisto“, „Proleta studanto“ k. a. Sub la sloganoj „La




esperantistoj estas en la unuaj vicoj de la batalo por Paco“ estis montrita la agado de la esperantistoj-batalantoj por paco, ilia laboro kaj kontraŭmilita batalo. En apartaj standoj estis montritaj originala kaj traduka E-literaturo, revuoj, gazetoj, ĵurnaloj. Per aparta intereso la vizitantoj rigardis la angulojn: „Ni havas geamikojn en la tuta mondo“, „Esperanto kaj internacia turismo“, „Esperanto kaj filatelio“, „Nia kontribuo por interkompreniĝo sur la Balkanoj“, „Nia agado por interfratiĝo de Ŝumen, Kraguevac kaj Debrezen“.

La ekspozicio estis vizitita ankaŭ de du esperantistinoj el Pollando, de esperantistoj el Varna kaj Blagoevgrad. Multaj el ili skribis siajn impresojn pri Esperanto kiel rimedo por paco kaj interkompreniĝo.

ESPERANTO-KONFERENCO EN VILAĜO RÂJEVO KONARE

Ĉu vere? Konferenco en vilaĝo?

Jes! Nome en vilaĝo Râjevo Konare, distrikto de Plovdiv. Tie ĉiuj kondiĉoj favoras por la celo. La vilaĝo troviĝas proksime de stacidomo. La loĝantaro estas gastama. Por ĉiuj 150 delegitoj kaj gastoj estas garantiita senpaga loĝejo en privataj domoj. Je nia dispono estas la vasta salono de la Kultura Domo, alia salono por ekspozicio, tute nova junulara dancsalono kaj konferencejo. Ĉu sufiĉe? Ne! La plej favoraj kondiĉoj estas la jenaj: la Komunista partio, la Komunumo kaj la Agrikultura kooperativo en Râjevo Konare ne nur finance helpis nin, sed okaze de nia kvina distrikta E-Konferenco la vilaĝa Sanitara Domo estis nomita „D-ro L. L. Zamenhof“.



Parto de la partoprenintoj en la konferenco

La anticipaj konferencaj solenaĵoj komenciĝis la 22-an de oktobro, sabate. La vasta salono de 500 sidlokoj ne povis akcepti ĉiujn vizitantojn. Pro tio en la vestiblo kaj ekstere estis multaj aŭskultantoj.

Unue estis projekciita por unua fojo speciala filmo dediĉita al vilaĝo R. Konare en kiu estas momentoj de la esperanta vivo en la vilaĝo.

Post la projekcio okazis granda mi-

tingo por paco. Parolis prof. D-ro Jivko Lambrev, prezidanto de Plovdiva Distrikta Pacdefenda Komitato. Post li pri Esperanto kaj la paco parolis N. Aleksiev, prezidanto de CK de BEA kaj de MEM. La mitingo akceptis telegramon kontraŭ la abomena milito en Vjetnamio.

Post la mitingo la ĥoro de la Kultura domo ekkantis la Esperantan himnon kaj aliajn kantojn. Riĉa programo! Deklamaĵoj, recitaĵoj, baletoj... kaj fine en la junulara salono la dancvespero daŭris ĝis meznokto...

Dimanĉe, la 23-an de oktobro estis oficiale nomita la vilaĝa Sanitara Domo de D-ro L. L. Zamenhof. La solenaĵon malfermis la vilaĝestro k-do Girginski. Post li la ĉefkuracisto D-ro Pardo dankis pri tio, ke la Sanitara Domo portos la nomon de la famekonata kuracisto kaj pacbatalanto Zamenhof. Pri la vivo de Zamenhof parolis Ivan Ŝivarov, prezidanto de Distrikta Esperanto-Komitato en Plovdiv.

En la alia salono antaŭ esperantistoj Rosica Georgieva parolis pri „Esperanto en la praktika vivo“.

En speciale ornamita salono komenciĝis la laboro de la kvina Distrikta E-konferenco. Ĝin gvidis la prezidanto de la loka E-societo k-do St. Darĵonov.

Inspiran salutparoladon faris la sekretario de la Komunista partio en R. Konare k-do Ivan Dermenski. Saluttelegramoj kaj salutleteroj estis ricevitaj de urboj Hisar, Beograd k. a. La prezidanto de DEK Ivan Ŝivarov faris raporton pri la atingajoj de E-movado dum la popoldemokratia regado en Bulgario, pri la stato de la movado en la distrikto de Plovdiv kaj specialan lokon li dediĉis al la E-junularo kaj al nia kursa laboro. Jam pasis la varma

somero -- diris li. Antaŭ ni estas la aŭtuno kaj post ĝi - la vintro. La plej taŭgaj sezonoj por laboro. . . Per tiuj vortoj finiĝis la raporto.

Post li parolis la reprezentantoj de ĉiuj E-societoj de la distrikto. Kun granda atento la partoprenintoj aŭskultis la interesan paroladon de N. Aleksiev, prezidanto de CK de BEA, kiu salutis la Konferencon. Estis akceptita rezolucio, kiu tekstas, ke E-movado en distrikto de Plovdiv estos puŝata antaŭen.



K-do Iv. Ŝivarov raportas



K-do Gerginski inaŭguras la Sanitaran Doman

Dum la konferencaj tagoj la esperantista kaj neesperantista publiko kun granda intereso rigardis la E-ekspozicion aranĝitan de E-societo en Asenovgrad.

La varma akcepto fare de la loĝantaro kortuŝis ĉiujn delegitojn kaj gastojn.

Neforgeseblaj horoj de ĝojo kaj amikeco!

Ĝis revido, geamikoj, en famekonata banloko Hisar, kie okazos nia sekvanta distrikta E-Konferenco.

Bonvenon tie!

La 23-an de oktobro 1966

Râjevo Konare

Ivan Ŝivarov

La partoprenintoj en la Distrikta E-Konferenco en vil. Râjevo Konare, regiono de Plovdiv, sendis protestan telegramon al S-ro Johnson, prezidanto de Usono, kontraŭ la agresa milito en Vjetnamio.

La konferenco sendis telegramon al CK de BKP, en kiu oni deklaras, ke aprobas la gvidlinion de la Partio, konstatas, ke la proleta kultura revolucio de „ĉinaj gvidantoj“ estas kontraŭ la batalo por paco en la tuta mondo.

Кампанията за абониране на сп. „Българска Есперантисто“ продължава. Сумите да се изпращат в канцеларията на съюза.

Feliĉan Novan 1967 Jaron al ĉiuj niaj kunlaborantoj kaj legantoj!

„La klubo de la amikeco“ ĉe la gimnazio en urbo Trojan malfermis kurson de Esperanto. La 31-an de januaro 1967 ni organizas letervesperon kaj atendas gratulkartojn, leterojn, proponojn por interŝango de grupaj vizitoj de lernantoj. Adreso: Esperanto—kurso ĉe la gimnazio, Trojan, Bulgario.

**ОКРЪЖЕН НАРОДЕН СЪВЕТ
ОТДЕЛ „НАРОДНА ПРОСВЕТА“**

№ И-10-1095

29. X. 1966 г., гр. Пловдив

Като имаме предвид повишения интерес към изучаването на езика ЕСПЕРАНТО, практическото му приложение в живота и връчения на 6 октомври 1966 г. на ОН в Ню-Йорк специален меморандум за разрешаване на езиковия проблем в света чрез възприемане на лесно заучимия ЕСПЕРАНТО, както вече две години подред се организираха, така и сега от 20 ноември т. г. всеки неделен ден от 13 до 15 часа в Клуба на есперантското дружество „Културо“ — Пловдив, ул. „Леонардо да Винчи“ № 6 (тел. 63-55)

се открива тримесечен курс за подготовка на преподаватели по есперанто в училищата, за курсовете и кръжоците.

Ръководител на курса ще бъде

Началник отдел „Просвета“:

Ив. Аксийски

Председател на ОК на Съюза на у-лите: В. Коцев

До Директора на

..... у-ще
гр. (с)
ПЛОВДИВСКИ ОКРЪГ

др. Пенчо Петров, дългогодишен учител в Икономическия техникум „В. Левски“ — Пловдив.

Таксата за целия курс от 5 лева — за курсистите от Пловдив и 3 лева за курсистите от другите селища на окръга се внася при записването, което става всеки ден от 18—19 часа в Клуба на есперантското дружество и в Клуба на литературните работници, ул. „Гаврил Генов“ № 4 до кино „Република“. Кандидатите от окръга се записват чрез писмо на адрес: П. К. 151 — за учителския курс, а таксата ще внесат при започването на курса.

